päivällisruokailun yhteydessä sekä koko viikon ajaksi ilman omaa opasta saapuville sokeille. Vähäinenkin esperantontaito riittää. Lisäksi tarvitsemme sujuvasti esperantoa puhuvia avustajia yhdelle ulkomaiselle osanottajalle. Tehtäviä voidaan jakaa useamman kesken (la–pe). Kun tiedämme vieraittemme matkustustavan ja saapumisajan, jaamme päivystysvuorot.

Kiinnostuitko ja haluat auttaa? Lähetä osoitteeseen [steleto@pp.inet.fi](mailto:steleto@pp.inet.fi) yhteystietosi ja kerro milloin ja miten pitkäksi aikaa voit avustaa vieraitamme.

Dankegon!

Ritva Sabelli

## Vizitindaj aranĝoj en eksterlando

troveblas ĉe [eventoj.hu/2018.htm](http://eventoj.hu/2018.htm)

### Hassuja juttuja...

Laihia situas en Ostrobotnio en okcidenta Finnlando, Vaasa estas la plej proksima grandeta urbo. Ĝi estas konata same kiel Skotlando en la mondo kaj Bulgaria Gabrovo en meza Eŭropo kun multaj ŝercoj pri avareco – aŭ ŝparemo kaj saĝo. Jen el Laihia ŝerce:

”Edzinigu riĉulinon, tutegale ŝi riproĉas (Ottakaa pojaat rikas akka, haukkuu se köyhempikin)”. Kaj serioze: ”Respekte ĉiun alparolu, atenton al ekster’ ne donu (Sanokaa pojaat kaikkia miähiä isännäksi, vaikka ne kelkkaa vetäs)”.

*Yritys kääntää lapsen luovuutta ja tahaton-ta, mutta naulankantaan osuvaa komiikkaa/ Provo redoni esperante infanan lingvan kreaĵon.*

*Viisivuotias kertoo: ”Meillä on mummin kanssa salakieli.” ”Mikä sen nimi on?” ”En tiedä... Tai tiedän.” Parin sekunnin päästä: ”Mummiiri!”*

*Kvinjarulino raportas: ”Ni, mi kaj avinjo, kreis propran lingvon.” ”Interese. Kia estas la nomo de tiu lingvo?” Pripensas du sekundojn: ”Nu... Hum... Avinjido!”*

## La 104-a UK: Informkanaloj, reta aliĝilo kaj LKK



Ĉe la skisaltejo, la delegacio de UEA kun kelkaj membroj de LKK kaj de Visit Lahti. Fotis Anna Striganova

La 104-a Universala Kongreso de Esperanto (20–27 de julio 2019) okazos en la progresema kaj naturamanta finnlanda urbo Lahtio (Lahti). Por trovi oficialajn informojn pri la plej grava Esperanto-evento de 2019, ni invitas vin noti la adreson kaj regule viziti la retpaĝon de la LKK: [esperanto.fi/uk2019](http://esperanto.fi/uk2019)

Vi povas ankaŭ sekvi la evoluojn rilatajn al la UK ĉe sociaj retejoj:

- oficiala Facebook-paĝo: [facebook.com/Lahtio2019](https://facebook.com/Lahtio2019)
- oficiala YouTube-kanalo: [youtube.com/channel/UC0rvzTsk3NtsCcgCqgxc2vA](https://youtube.com/channel/UC0rvzTsk3NtsCcgCqgxc2vA)
- Twitter: [twitter.com/lahtio2019?lang=fi](https://twitter.com/lahtio2019?lang=fi)
- Instagram: [instagram.com/uk2019lahtio](https://instagram.com/uk2019lahtio)
- Esperanto en la regiono de Lahti: [facebook.com/esperantolahti](https://facebook.com/esperantolahti)

Ŝatu, dividu kaj ne timu marki viajn afiŝojn,

pensojn, atendojn kaj ankaŭ demandojn uzante la kradvorton #Lahtio2019 – ni antaŭfestu nian 104-an UK-on! Por komenci, kial ne spekti tiun simpatian bonvenigan filmon de niaj organizantoj: [youtu.be/5EFOVs-PDkg](https://youtu.be/5EFOVs-PDkg) – Jes, bonvenon al Lahtio! Aliĝu nun!

La 104-a UK akceptis la unuajn aliĝojn jam dum la 103-a UK en Lisbono, per papera aliĝilo en la kongresa sako. La aliĝnumero 1 estas rezervita al la gajninto de la kongresa aŭkcio. Nun la tuta mondo povas plej facile kaj naturamike aliĝi per la reta aliĝilo: [uea.org/alighoj/uk\\_alighilo](http://uea.org/alighoj/uk_alighilo)

Atentu kaj atentigu viajn konatojn: la plej favorpreza aliĝperiodo daŭros ĝis la 31-a de decembro 2018. La kotiztabelon vi povas trovi ĉe la retpaĝo de UEA: [uea.org/alighoj/uk\\_kotiztabelo](http://uea.org/alighoj/uk_kotiztabelo)

Fine ne forgesu, ke plej multe ŝparas la individuaj membroj de UEA kaj TEJO, ĉu bazaj

aŭ abonantoj. Do nepre (re)aliĝu por ne mistrafi la plej favoran kotizon: [uea.org/alighoj/alighilo2019](http://uea.org/alighoj/alighilo2019)

## La Loka Kongresa Komitato

La finnlanda LKK, aprobita de la Estraro de UEA, jam plene laboras por malfermi al ni, esperantistoj, sian simpatian urbon kaj landon:

- prezidanto: Tuomo Grundström
- vicprezidanto, kongresejo: Päivi Saarinen
- ĝenerala sekretario, volontuloj: Tiina Kosunen
- ekskursoj: Tiina Oittinen
- arta kunordiganto, kasisto: Paula Niinikorpi
- informado: Jukka Pietiläinen
- junulara programo, reta informado: Larissa Phileas
- membro, blindulaj aferoj: Börje Eriksson
- membro, Lahti-aferoj: Synnöve Myntinen
- membro, IIK-aferoj: Sigrid Kivistö

De la 14-a ĝis la 16-a de septembro dum la tradiciaj Aŭtunaj Tagoj de Esperanto-Asocio de

Finnlando okazis jam la dua kongresprepara trejnseminario. Partoprenis ĝin kvindeko da aktivuloj kaj la Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, *Clay Magalhães*, kiu traktis kun oficistoj de la urbo organizajn aferojn rilatajn al la UK. Ni aldone informas, ke de la 30-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro delegacio de UEA, gvidita de *Fernando Maia Jr.*, estrarano pri kongresoj, vizitis Lahtion laŭ invito de la urbaj instancoj por labori pri nia UK kune kun la LKK. [Vidu la bildon pri la vizito de la delegacio sur la plej granda skisaltejo de Lahtio. Aldono de EF-redakcio.]

Kaj ne forgesu: ĉiuj - individuoj, Landaj Asocioj, kluboj, organizantoj de eventoj ktp. - povas mendi la Unuan Bultenon kaj paperan aliĝilon ĉe la CO de UEA. Bv. menciĝi la kvanton bezonatan de tiuj materialoj en la mendo, sendota al [sekretario@co.uea.org](mailto:sekretario@co.uea.org) aŭ letere al la adreso de la CO: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

laŭ GK 761

## La LKK informas

Loka Kongresa Komitato (LKK) kunvenis dum Aŭtunaj Tagoj, kiam ankaŭ la Konstanta Kongresa Sekretario KKS *Clay Magalhães* ĉeestis (vidu Esperantolehti 4/2018, paĝo 10). Duan kunvenon LKK havis la 27-an de oktobro en Helsinko. Fine de oktobro okazis renkontiĝo de kelkaj LKK-anoj kaj reprezentantoj de UEA (Universala Esperanto-Asocio) kaj TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) en Lahtio. Legu pli en GK 761 de UEA.

Diversaj aferoj estos, estas kaj jam estis prilaborataj de LKK. Eble plej multe da konkretaĵoj okazis ĝis nun en mia laborkampo, kio estas la kongresaj ekskursoj. Estas planitaj ekskursoj dum la kongresa semajno, kiam oni konatiĝos kun la kongresa urbo Lahtio. Tuttagaj ekskursoj montros al la partoprenantoj krom la regionon de Lahtio ankaŭ la antaŭan kongresurbon

Tampere, la ĉefurbon Helsinko, loĝejan foiron en *Kouvola* kaj la ĉirkaŭaĵon de *Tuusulanjärvi*, kiam oni sekvos la spurojn de la komponisto *Jean Sibelius* kaj de aliaj finnlandaj artistoj. Antaŭkongreso okazos en Helsinko kaj postkongresoj direktiĝos al orienta, norda kaj okcidenta Finnlando.

En marto kiam ni havos Vintrajn Tagojn kun la tria Trejnseminario ni jam scios pli detale pri la ekskursoj kaj eble jam havos unuajn informojn pri la mendoj. Ni povos kune prepariĝi ankaŭ en la ekskursaj taskoj. Nature ni scios pli multe ankaŭ pri aliaj aferoj de la kongresaj preparoj, do indas veni al Lahtio tiam.

Bonan jarŝanĝan tempon al ĉiuj!

*Tiina Oittinen,*  
respondeculo de ekskursoj en LKK

# Tiesitkö,

## että Euroopan Unionin hallinnon kieliä koskeva erityislainsäädäntö on kuusikymmentä vuotta vanha?

Se on vuodelta 1958, jolloin jäsenmaita oli kuusi ja niillä kaikkiaan neljä virallista kieltä. Nyt on 28 jäsenmaata ja niillä 24 keskenään tasa-arvoista virallista kieltä. Ne määräytyvät jäsenmaiden virallisten kielten mukaan, mikä selittää valtioitten ja kielten eri määrät: Belgia (ranskaa ja hollantia), Luxemburg (ranskaa ja saksaa, myös paikallinen letzeburgi on virallinen, mutta maa ei ilmoita sitä EU-kieleksi), Itävalta (saksaa). Kypros ilmoittaa EU-kielekseen vain kreikan; turkki on toinen virallinen kieli, mutta vakiintumattoman hallitusvallan vuoksi sitä ei ilmoiteta EU-kieleksi.

Alueellisia ja muita vähemmistökieliä on EU:n alueella noin kuusikymmentä. Baskia puhuu Espanjassa ja Ranskassa noin miljoona, friisin eri muotoja Alankomaissa ja Saksassa noin puoli miljoonaa. Yllä mainitun letzeburgin puhujia, kaksi- tai kolmikielisiä, on ainakin puolet maan asukkaista. Itäisen Saksan Bautzenin ja Cottbusin seudulla slaavilaisen sorbin puhujien määrä arvioidaan 20 ja 60 tuhannen välille. Vähemmistöistä suurin ja erittäin elinvoimainen on puhujamäärältään suomea kaksi kertaa suurempi katalaani, jonka virallinen Espanja oli kieltänyt lähes neljänkymmenen vuoden ajan. Hajallaan, diasporana, on romani; mustalaisia arvioidaan olevan koko maailmassa noin 40 miljoonaa, joista 10–20% osaa romanikieltä, ja jiddiisiä, ”juutalaisaksaa”, osataan edelleen Euroopassakin huolimatta synkstä historiasta. Saameakin voi pitää tavallaan diasporakielenä. Saamenkielisiä on kaikkiaan enintään satatuhatta, joista kymmenentuhatta Suomessa. Lahden maailmankongressin ohjelmassa alkuperäiskielistä ja erikseen saamesta on ohjelmaosuuksia.

Veteraanitoimittaja Hannu Reime on kirjoit-

tanut näistä asioista zamenhofilaisesti: *Ajatus Euroopan liittovaltiosta, jossa kansallisvaltioiden valta olisi nykyistä paljon heikompi, voi olla hyvinkin houkutteleva maanosamme pienille kansansirpaleille. Baskille tai bretonin kielen puhujalle tai korsikalaiselle saattaa olla helpompaa samaistua yhtä aikaa omaan kieleensä ja kulttuuriinsa, espanjalaisuuteen tai ranskalaisuuteen ja eurooppalaisuuteen: ei ole mitään ristiriitaa olla sekä baski, espanjalainen että eurooppalainen – niin, ja lopulta ihmiskunnan jäsen. Omaan kansallisvaltioon tarrautuvalla nationalistilla sitä vastoin tällainen näköpiirin laajentaminen voi osoittautua ylivoimaiseksi asiaksi.*

Kaikki 24 valtionkieltä ovat siis unionissa tasa-arvoisia keskenään sillä perusteella, että kaikki EU-kansalaiset ovat tasa-arvoisia. Heitä koskevia säädöksiä ja sopimuksia tulee heidän itsensä ymmärtää ilman välikäsiä. Myös hallinnon, valmistelun ja päätöksenteon, tulisi toimia niin, että kaikista kansalaispiireistä, joka alueelta voidaan oikeasti ja rajoituksetta osallistua.

Kun ottaa esiin europa.eu –verkkosivun, ensimmäisenä on kielivalinta. Jos valitsee englannin, ei seuraa enää valintoja. Jos valitsee suomen ja etenee vaikkapa koulutukseen, kohtaa suomea tämän verran: *Suurin osa uuden koulutusviraston sisällöstä on tällä hetkellä saatavilla ainoastaan englanniksi. Sivuja käännetään parhaillaan EU:n muille virallisille kielille, ja kaikki kieliversiot lisätään sivustolle niiden valmistuttua.* Virallinen lehti ja voimassaolevat säädökset ovat joka kielellä, samoin puhelinalvelu ja kirjallinen yhteydenotto. Jos aikoo hakea töitä, hakuohjeetkin ovat kaikilla unionikielillä, kuten pitääkin. Selvää tietenkin



on, että englannin (ranskan, saksan) taito on lähes tehtävästä riippumatta niin keskeinen, että kielen syntyperäinen osaaja on etuasemassa. Sitä ei tietenkään sanota eikä voisikaan ilmaista, koska se rikkoo kielellistä tasa-arvoa; kärkeästi ilmaisten toiset ovat tasa-arvoisempia kuin toiset, tai kysymykseen demokraattistenkin instituutioiden kielitasa-arvosta voi pomia

menneen maailman vastauksen ”periaatteessa kyllä”.

Muuten, olisiko ajatus rasittaa kielten epä-tasa-arvosta hyötyviä valtioita pienillä maksuilla epäreilu vai voisiko se tukea unionin perusteitaan ihan edistyskellistä kielipolitiikkaa?

*Tuomo Grundström*

## Zamenhof en Varsovio

Jam proksimume sesdek jarojn mi studis Esperanton kaj vivis kun la lingvo mem. Estis granda aventuro iom post iom penetri en la sekretojn de la lingvo kaj ekkoni ĝian iniciatoron. Dum la pasintaj jardekoj mia entuziasmo neniel velkis sed tute kontraŭe kreskis kaj prosperis. Efike nutris mian scivolemon la elsendoj de Pola Radio el Varsovio. Kiel komencanto mi ne povis kompreni plene la enhavon de la programeroj, sed brile ili sukcesis kapti min kaj kateni en pozitiva senco.

Kuraĝe mi aliĝis al la Universala Kongreso en Bruselo 1960. Ŝipe mi veturis el Turku al Stokholmo. Poste mi daŭrigis trajne al la celo. Okazis multaj haltoj. En Svedio mi pasigis kelkajn tagojn en Skövde kaj en Malmö. *Märta Jensie* donis sian loĝejon je mia dispono. Ĉio ruliĝis kvazaŭ en fabelo. Estis mia unua sperto vojaĝi eksterlande kiel esperantisto. Nekredebla estas la ĝusta adjektivo por ilustri detale ĉiujn okazintaĵojn. *Oskar Runarheim* kiel patro rilatis al juna sensperta movadano.

En Kopenhago dano *Mogens Groth* vikle kaj bonhumore prezentis al mi la ĉefurbon. Lia edzino Else efike kulturis nordlandan gastamon. Ankaŭ hodiaŭ la memoro pri tiu vizito estas viva kaj freŝa. ”Pasintaj tagoj ne revenos, sed memoras mi.” Poste sekvis similaj spertoj en Hamburgo, kie mi estis gasto en la konata hejmo de Weide-familio.

En Bruselo mi kun akraj oreloj kaj rondaj okuloj sekvis la festparoladon de profesoro *Ivo*

*Lapenna*. Tie mi ekkonis en la jaro 1960 eldonitan biografion de Zamenhof en la angla verkitan de *Marjorie Boulton*. Poste venis novaj verkoj de aliaj aŭtoroj kaj ili fascinis min. Klasika kaj tre taŭga por novuloj en la movado estas la klasikajo de *Edmond Privat*.

Jam regas en mia vivo velksezo. Tiun esprimon povas uzi 87-jarulo. Sed entuziasmo ankoraŭ ardas. Pro tio mi estas feliĉa. Ne plu eblas vojaĝi eksterlande, sed legado de bonegaj verkoj nutras mian scivolemon. Vere proksima al mia koro estas ”Zamenhof en Varsovio” de varsoviano *Roman Dobrzynski*. La riĉe ilustrita libro estas tre praktika gvidilo por ĉiu, kiu emas ekkoni Varsovion sur la paŝoj de doktoro ”Esperanto”. Via koro batos forte dum legado. Antaŭ jardekoj estis por komencanto malfacile trovi taŭgan fontmaterialon. Nune tiaj verkoj abundas. Nur kelkajn oni povas ĉi tie mencii.

”Lidia” de *Wendy Heller* estas nune legebla jam ankaŭ en Esperanto kaj origine en la angla lingvo, do temas pri kun varma koro skribita biografio de la filino de Zamenhof. Detala kaj riĉenhava verko ĝojigas veteranon en flegeja hejmo kaj vokas daŭre al ripeta legado. ”Per flugiloj de facila vento” mi povas partopreni movadan vivon. Vivo estas donaco. Ni estu danke-maj pro tio. Kiam ni povas subteni kaj utiligi la Zamenhofan lingvon, la suno brilas al ni ankaŭ dum nubaj tagoj.

*Jorma Ahomäki*  
movadano jam dum 60 jaroj

## ”Vivanta naturo, floranta kulturo”: Kongresa temo de la 104-a UK

La kongresa temo de nia 104-a UK estis elektita de la Estraro de UEA komune kun la LKK kaj formale anoncita la 3-an de aŭgusto, fine de la 103-a UK en Lisbono, kiel eblas rememori en la kongresa retejo: [esperanto.fi/uk2019/kongresatemo/](http://esperanto.fi/uk2019/kongresatemo/). Ĝi estas ”Vivanta naturo, floranta kulturo”.

Ĉi-sube, vi trovos analizon de la Prezidanto de UEA, D-ro *Mark Fettes*, pri la kongresa temo de Lahtio, sonanta ankaŭ kiel invito al nia 104-a UK, kiu jam promesas esti verde lernoplena. Se vi ne jam aliĝis, legu tekstofine kiel fari.

“La UK-urbo Lahtio fieras pri sia verdeco. ‘Elstare verda’, ‘naturkonforma’ – jen la trajtoj, kiujn ĝi volas prezenti al la mondo. Kaj nia elektita temo por la 104-a UK eĥas la vizion de la urbo. ‘Vivanta naturo, floranta kulturo’ – tiu kunmeto celas pensigi nin kaj aliajn pri la interligiteco de la homa mondo kun la multe pli vasta vivanta mondo ĉirkaŭ ni.

Jam de pli ol du jarcentoj, diversaj sociaj kaj ideaj movadoj avertas pri la kreskanta fendo inter homoj kaj naturo. Temas pri ambaŭflanka damaĝo. Jen, unuflanke, la naturo suferas, ĉar homoj ekrigardas ĝin kiel nuran fonton de resursoj, malfermitaj al senbrida ekspluatado. Jen, aliflanke, la homo suferas, ĉar enfermita en la bruo kaj premo de la industrio, de la urbejoj, de la konsumismo. La sekvojn ni vidas ĉirkaŭ ni ĉie, tutmonde. Velkanta naturo, febranta kulturo...

Sed la temo instigas nin ne halti ĉe tiuj konstatoj, sed antaŭenirigardi. Kiel restarigi harmonian rilaton inter la homa kulturo kaj la pli-ol-

homa naturo? Kiel niaj kulturoj devas ŝanĝiĝi por reproksimigi nin al niaj samteranoj, la plantoj kaj bestoj, la maroj kaj montoj? Kaj kion oni faras jam nun por stiri niajn sociojn en tiu direkto?

Per feliĉa koincido, 2019 estas proklamita de UN kaj Unesko kiel la Jaro de Indiĝenaj Lingvoj. Jen unu el la vojoj, kiujn ni spuros en Lahtio. Indiĝenaj lingvoj estas mirindaj trezoroj de indiĝenaj kulturoj, kulturoj bazitaj sur intima interrilato kun la temo kaj ĝiaj loĝantoj. Prelegoj, atelieroj kaj laborgrupoj celos klerigi nin pri tiu grava parto de la monda kultura heredaĵo, kaj pensigi nin pri ĝiaj instruoj por la nuntempo. Ni krome vidos kelkajn aspektojn de la streboj konservi kaj revigligi tiujn lingvojn tie, kie ili estas minacataj de malapero.

La urbo mem proponos diversajn lecionojn kaj modelojn al ni. Ĝi reduktas sian utiligon de karbono, malpliigas la rubaĵojn, protektas akvojn kaj arbarojn, faciligas la senaŭtan transportadon... kaj pri ĉio ĉi ni povos lerni per la prelegado kaj ĉiĉeronado de lokaj fakuloj. Kaj Lahtio krome fieras pri sia kultura vivo, inkluzive de bonega simfonia orkestro kaj internacie konata tradicio de vintraj sportoj. Ĉu skiado kaj Sibelius povas proksimigi nin al la naturo? Finnoj diros, ke jes...

Tiuj estas nur kelkaj aspektoj de riĉenhava temo. Venu al Lahtio por sperti mem, kiel la kongreslandaj naturo kaj kulturo povas nutri ankaŭ nian propran, verdan kulturon!”

*laŭ GK 764*

# Vizito en la Esperanto-Muzeo en Vieno

Dum karavano al Vieno *K. Rohdin* kaj *Saliko* vizitis la Esperanto-Muzeon. Post ioma interparolo kun *Christian Cimpa*, laboranta pri la fotostoko de la muzeo, ni estis tre amike bonvenigataj kaj ni lernis multon pri kio enhavas la muzeo: 60 postlasaĵoj (i.a. de *Kalocsay*, *Schamanek*, de *Seabra*, *Serišev*, *Ŝirjaev*, *Wüster*), 1.500 afiŝoj, 3.700 revuoj (diversaj titoloj), 22.000 fotoj, 35.000 volumoj kaj 40.000 flugfolioj. El tiuj fine de 2018 estas ciferecigitaj kaj konsulteblaj en interreto: 1.200 libroj, 1.200 jarkolektoj de revuoj kaj 1.000 afiŝoj.

Ni hazarde vidis foton pri SEF-kongreso en *Malmö* 1955, sur kiu *Kerstin* rekonis siajn patron, *Nils Olsson*, kaj onklon, *Olle Olsson*. Ni komputile vidis fotojn pri *Setälä*, juna *Hemmo Tietti* kun *Veera* kaj filineto *Silja*, *Seija Kettunen*. Tio estis kvazaŭ miraklo. Oni facile serĉis tajpante la nomon de la serĉato. La materialo estas tre interesa kaj povus plenigi kaj riĉigi klubvesperojn.



Ĉokolado



Retumante oni lernas pri la vivo en Esperantujo. Oni povas serĉi inter la katalogitaj libroj kaj eĉ prunti per via loka biblioteko. Komencu per la serĉvorto Esperantomuzeo kaj inter la multaj trafoj unue prenu la vikipedian artikolon, kiu legeblas en germana kaj angla lingvoj sed parto ankaŭ en Esperanto. Inter la recenzintoj 89% trovas la muzeon bon(eg)a kaj 11% malbona.

La muzeo pri "Esperanto kaj planlingvoj" situas centre en Vieno. Iru kaj vidu kaj aŭdu filmeton pri Esperanto, uzbla en 3 lingvoj, E, germana kaj angla. Provu ankaŭ la LUDO-amuzilon. Dum nia vizito almenaŭ 5 aliaj interesatoj envenis, eĉ tiaj kiuj ne posedas E-ton.

Eniro en la virtualan muzeon:

[www.onb.ac.at/eo/museen/esperantomuzeo/](http://www.onb.ac.at/eo/museen/esperantomuzeo/)

*C. Cimpa, K. Rohdin, R. Pyhälä (kunlabore)*

## Kuusi vuosikymmentä anopin viitoittamalla tiellä

Saavu in Turkuun opiskelemaan 1952. Anopini Turun tyttökoulun silloinen rehtori Irja Klemola johdatteli minut esperanton pariin. Noihin aikoihin Turun tunnetuin esperantisti oli akateemikko Yrjö Väisälä. Veljekset Kalle, Yrjö ja Vilho Väisälä olivat kaikki innokkaita esperanton harrastajia. Irja Klemola oli osallistunut Helsingin kongressiin 1922 opiskellessaan matematiikkaa pääkaupungin yliopistossa.

Vävypojan innostaminen oli helppo tehtävä. Auralan opistossa Tuomiokirkkoseurakunnan urkuri Pauli Riihivaara ohjasi innokkaasti alkeis- ja jatkokurssia. Melko nopeasti siirryin itsekin opettamaan esperantoa Kaarinan Rauvolan kansakoulussa. Vieraan kielen opetus oli siihen aikaan harvinaista kansakoulussa. Seurasi oppilaiden vilkas kirjeenvaihto ulkomaa-laisten koululaisten kanssa. Opettajakin kävi kielen synnyinkaupungissa 15 kertaa.

Silloin paikalliset oppaat Puolan radion toimittajat Andrzej Pettyn ja Barbara Pietrzak

esittelivät kotikaupunkiaan. Nyt on Rotterdamissa ilmestynyt teos ”Zamenhof Varsovasa”, jossa esitellään viisi eri reittiä esperantoon ja sen historiaan liittyvissä merkeissä. Kirja on tunnetun radio- ja tv-toimittajan Roman Dobrzyńskin laatima. Siinä on yksityiskohtaiset ohjeet kulkuvälineistä ja niiden pysäkeistä kunkin nähtävyyden osalta. Matkailija voi ihan omatoimisestikin vaeltaa Puolan pääkaupungissa.

Ensi kesänä 20-27. heinäkuuta 2019 järjestetään Lahdessa 104. yleismaailmallinen esperanto-kongressi. Edellämäinitun teoksen lukeminen sanakirjan avulla on hyvää valmentautumista aloittelijallekin Lahden kongressia varten. Tartu rohkeasti härkää sarvista ja käy opiskelemaan. Et tule pettymään. Saat avaimet monipuoliseen maailmaan helpon kielen avulla.

Jorma Ahomäki,  
anoppinsa opetuksia seurannut

### E-karavano 2019 tra Rusio, Mongolio kaj Ĉinio post la kongreso

Kara geomikoj,  
mi invitas vin partopreni la postkongresan E-karavanon en 2019 tra Rusio, Mongolio kaj Ĉinio. Estas bonvenaj ankaŭ viaj E-samlاندان kaj diverslandaj geomikoj. Pliajn detalojn bv. legi en [esperanto-karavano.info/itinerario2019.html](http://esperanto-karavano.info/itinerario2019.html)

Mi estus dankema, se vi povus informi interesatojn pri la planata EK-2019 pere de lo-kaj E-periodaĵoj.

Antaŭdankon!

Amike, Tatjana.  
[lota.esperanto@mail.ru](mailto:lota.esperanto@mail.ru)

## Finnlandaj havenurboj Esperante

Foje finnlingvaj samideanoj iom ridetas pri la praktiko oficiala en UEA esperantigi loknomojn. Lahtio estas nia sekva kongresurbo, antaŭa estis Tampere (tamen ne timu pereon) kaj Helsinko (ne timu sinki).

Tio inspiris al esperantigo de lerneja kantoforma memorhelpo listiganta la Finnlandajn havenurbojn de la norda fino de Botnia Golfo ĝis la lasta orienta havenurbo ĉe Finna Golfo.

Kantata laŭ la melodio "Honkaen keskellä" ("Inter pinegoj dometo staradas")

Tornio, Kemio,

Oŭlo, Braheo,

Karlio, Jakoburbo, Novkarli'.

Vaso, Kaskeo, Kristin', Ursoburgo,

Raŭmo, Novurbo kaj Gracoval'.

Turkuo (aŭ Abo'), Turkuo (aŭ Abo'),

Hanginsulo, Raseburgo, Helsinko.

Borgo kaj Lovis',

Kotko kaj Hamin'.

Ĉiu havenurbo jam prezentis sin.

Por orientiĝi laŭ mapo la nomoj finne/svede: *Tornio/Torneå, Kemi, Oulu/Uleåborg, Raah/Brahestad, Kokkola/Karleby, Pietarsaari/Jakobstad, Uusikaarlepyy/Nykarleby, Vaasa/Vasa, Kaskinen/Kaskö, Kristiina/Kristinestad, Pori/Björneborg, Rauma/Raumo, Uusikaupunki/Nystad, Naantali/Nådendal* (signifo "valo de graco"), *Turku/Åbo, Hanko/Hangö, Raasepori/Raseborg* (eksnomo: *Tammisaari/Ekenäs*), *Helsinki/Helsingfors, Porvoo/Borgå, Loviisa/Loviisa, Kotka, Hamina/Fredrikshamn*.

Leksiko estas serioza afero, loknomoj eble ankaŭ emocia, sed ŝerco permesatu...

-tg

## Julfesto de EST en Turku



Esperanto-societo en Turku (EST) festis la 11.12. en jula festeto kun membroj kaj amikoj. Ĉe la tablo sidas maldekstre Merja, Eira-Liisa, Tuuli, Paula N., Leena kaj Tuomo; dekstre Eeva, Juha, Orvo, Hiikka, Hannu, Kari kaj Paula H. Fotis Tiina O.

## El la libro de Jozef Borský: 1111 ANEKDOTOJ EN ESPERANTO

48. Revenas du viroj el gastejo kaj unu volas malŝlosi pordon per cigaredo. Lia kunulo atentigis lin pri tio kaj la ebrulo ektimas: "Ĉu eble mi forfumis la ŝlosilon?"
56. "Sinjoro, vi asertis, ke vi batalas kontraŭ alkoholaĵoj." "Jes, sed ili ĉiam venkas min."
83. Diras marvirineto al alia: "Ke maristo estas tre ebria vi scias, ke li laŭdas viajn belajn gambojn."
95. "Via nova fianĉo ne plaĉas al mi", diras patrino al sia filino, kiu respondas: "Bonŝance ankaŭ vi ne plaĉas al li."
114. Filino prezentas al siaj gepatroj sian amindumanton: "Jen Timoteo, mia estonta unua edzo."
137. "Peĉjo, ĉu vi amas min?" "Jes, karulino, ege." "Ĉu vi pro mi oferus vian vivon?" "Ho ne, kiu do poste amus vin?"
139. "Hieraŭ mi ekkonis virgan fraŭlinon." "Ĉu vere? Ĉu vi povus interkonatigi min kun ŝi?" "Mi povus, sed hodiaŭ jam estas malfrue."
147. "Kiel amindumas erinacoj?" "Tre, tre, tre atenteme."
160. "Sinjorino, via hundo ĝuste pelas iun homon sur biciklo." "Sensencaĵo, nia hundo ne scipovas bicikli."
166. "Kial havas ĝirafo tiel longan kolon?" "Ĉar ĝi havas tiel for la kapon."
178. "Ĉu laboras ĉe vi sinjoro Piro?" "Li ne laboras, li estas la estro."
184. "En nia entrepreno laboras veraj idiotoj." "Kiu estas la dua?"
192. "Kiom kostas tiu ĉemizo?" "Dudek eŭrojn." "Kaj ĉu vi ne havas ion malpli koston?" "Jes, ni havas. Ŝtrumpojn."
199. Staciestro en Oulu al nova laboristo: "Prenu lubrikilon kaj iru oleumi relkomutilojn." Post du semajnoj venas mesaĝo: "Mi estas en Tampere, sendu pli da oleo."
213. "En nia entrepreno ni estas kiel unu familio. Ni ne toleras unu la alian."
217. "Sinjoro direktoro, kial vi translokigis tiun belan kaj agrablan sekretariinon en alian sekcion kaj nun havas sekretarion?" "Mi ne plu povis elteni konduki kiel ĝentlemano."

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi).**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki) [jukka.p.pietilainen@gmail.com](mailto:jukka.p.pietilainen@gmail.com) (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispuhantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 [onni.kuappinen@gmail.com](mailto:onni.kuappinen@gmail.com)
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 044 953 4454 [kimmo.hannula@creavit.fi](mailto:kimmo.hannula@creavit.fi), [www.esperanto.fi/jyvaskyla](http://www.esperanto.fi/jyvaskyla)
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala [www.esperanto.fi/oulu](http://www.esperanto.fi/oulu) [aini.esp@hotmail.com](mailto:aini.esp@hotmail.com)
- ♦ Esperantoseura Antaüen r.y. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere [www.esperanto.fi/grupoj/tampere](http://www.esperanto.fi/grupoj/tampere) (Tapani Aarne: [tapani.aarne@mbnet.fi](mailto:tapani.aarne@mbnet.fi) ☎ 050 5245 823)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. [www.esperanto.fi/grupoj/turku](http://www.esperanto.fi/grupoj/turku) [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi) ☎ 050 549 4709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi) ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 ITELFIHH (445023-283606)
- ♦ Näkövammaisten esperantoyhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. <http://www.steleteo.fi/> ☎ (09) 660 651 [steleteo@pp.inet.fi](mailto:steleteo@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen jäsen). [bovoeo73@gmail.com](mailto:bovoeo73@gmail.com).

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla, Salossa ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna  
aperas dum la jaro

2019

Nro	Limdato	Aperas
1/2019	28.1.	en februaro
2/2019	31.3.	en aprilo
3/2019	31.5.	en junio
4/2019	1.9.	en septembro
5/2019	15.11.	en decembro

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 €	1/1 sivu/paĝo 50 €
1/2 sivu/paĝo 60 €	1/2 sivua/paĝo 30 €
1/4 sivu/paĝo 40 €	1/4 sivua/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo:

[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi) aŭ poŝte al la oficejo:  
Esperantolehti/EAF, Siltasaarekatu 15 C 65,  
00530 Helsinki.

## Lastaj vortoj de la ĉefredaktoro

Karaj,

temp' está! Alvenis la momento fini la provizoran redaktadon de *Esperantolehti* miaflanke. Mi dankas por la ricevitaj spertoj kaj fido, kaj restas espero, ke alia daŭrigu la gazeton de EAF. La redakta grupo restos, same la adreso, al kiu sendi viajn eventualajn kontribuojn: [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi) aŭ [eaf-redakto@yahoogroups.com](mailto:eaf-redakto@yahoogroups.com)



*Ĉian agrablan estonte,  
Robert Bogenschneider*

### Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy helmikuussa. Aineisto 28.1.2019 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en februaro. Artikoloj ĝis 28.1.2019 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi)>.